

# Usona Esperantisto № 2020:4 (jul-aŭg)

## Announcements

UEA petas subtenon por retaj projektoj; Plibonigu vian parolkapablon, senpage; Forpasis Susan MEYER; Esperanto en prizonoj

## La mirinda sorĉisto de Oz ... in DNA?

media hits

Follow the yellow (green?) brick road.

## La 17 celoj por daŭripova evoluigo por 2030

de la prezidanto • Filipo DORCAS

Historio ne juĝos nin per la grandeco de niaj problemoj, sed per tio, kiel ni respondas al niaj defioj.

## De la estraro

Raportoj de la Direktoroj kaj aliaj estraranoj.

## La historio de psikedelismo en Usono

kulturo • Steve EICHBLATT

En nia tempo oni asocias la vorton *psikedelismo* kun hipioj, "floropovo", kaj artaĵoj de la 1960-aj jaroj. Sed ĝia historio estas multe pli longa.

## Laboro frustra, sed (espereble) agrable

traduku! • HOSS FIROOZANIA

"Kiel oni povas verki tiel klare, sed tiel netradukeble?"  
(Tradukoj de la defio el *Ombro sur interna pejzaĝo*; nova defio el la kanto *Dek bovinoj*.)

## La vivo de Peĉjo

ŝercoj • Timothy BORONCZYK

"Esperanto? Nobody speaks Esperanto."

## Ĉu komputero, komputilo, komputoro, komputro, aŭ kio?


el la arĥivo

Eble ĝuste pro tio, ke la vorto *komputero* tiel malfrue registriĝis en iom aŭtoritata fonto, ĝia formo en 1977 restis tute malstabila.

## Malbone

senintenca esperantaĵo • Ellemberg ENRIQUE

Bedaŭrinde, homoj iam fartis vere malbone ĉe Malbone-strato.



# Anoncoj

## Rezultoj de la ĉi-jara balotado

Jen la rezultoj de la ĉi-jara balotado, anoncitaj ĉe nia virtuala Landa Kongreso en Julio:

- Prezidanto: Filipino DORCAS
- Vic-Prezidanto: Alex MILLER
- Direktoro: Hoss FIROOZNA
- Direktoro: Tim RICE



Ĉiuj deĵoros ĝis 2023. Gratulon al ili, kaj koran dankon al ĉiuj, kiuj kandidatiĝis.

## Forpasis Susan MEYER

Susan Amy Stamps MEYER mortis la 11-an de Julio en unu-aŭta akcidento sur kampara vojo sude de Bonham, Teksaso. Ŝi havis 72 jarojn. La funebraĵo okazis en Sherman, Teksaso, kie ŝi estis enterigita en la tombejo Cedarlawn.



Susan provis dum pli ol kvindek jaroj lerni Esperanton. Fine ŝi povis iom kompreni Esperanton kaj diri simplajn frazojn. Lingva lernado estis malfacila por Susan. Ŝi amis la amikecon kaj la homecon de esperantistoj. Ŝi partoprenis en multaj landaj kongresoj, interalie ĉe Sankta Luiso, Sakramento, Montrealo, Aŭstino, Dalaso, Raleigh, Miamo, Seatlo, kaj Bostono. Susan tre ŝatis tiujn en Seatlo kaj Bostono. Ŝi partoprenis ankaŭ en la Universalaj Kongresoj en Vankuvero kaj Gotenburgo. Susan plaĉe anticipis denovan viziton al Montrealo. Ŝi ankaŭ kelkfoje partoprenis en NASK.

Susan naskiĝis la 23-an de Marto, 1948 al la pasintaj Frank kaj Shirley (Garner) Stamps. Ŝi diplomiĝis de Bridge City High School en Bridge City, Teksaso en

1967. Ŝi kaj Fred Meyer III geedziĝis la 25-an de Aŭgusto, 1968. Sinjorino Meyer dum multaj jaroj laboris ĉe Fred Douglas School kaj Sherman High School kiel instruista asistanto kun lernantoj en profunde kaj emocie malavantaĝaj statoj.

Susan ĝuis tendumadon kun geamikoj, legadon, kuiradon, kudradon, kaj artmetion, speciale recikligadon de ordinaraj aferoj en artaĵojn. Dum tendumado, ŝi ĝuis esti la ĉefa kuiranto por la grupo. Ŝi ĝuis ankaŭ kuiru por aliaj grupoj. Susan kudris la edziniĝajn robojn komence je ŝablonoj por siaj fratino kaj plej aĝa filino. Ŝi faris dekoraciojn por kelkaj grandaj familiaj reunuiĝoj, kelkaj politikaj kunvenoj, kaj la Landa Kongreso en Dalaso. Susan ankaŭ amis kartludojn, aparte la rumion *Crazy Bee*, kaj domenon. Ŝi estis ankaŭ aktiva en lokaj politikaj agadoj protestante, volontulante en politikaj oficejoj, kaj ĉeestante lokajn kaj subŝtatajn politikajn kongresojn.

Sinjorino Susan Meyer estas postvivata de sia edzo, frato, fratino, du filinoj kaj iliaj edzoj, unu filo, kaj sep genepoj. Ili ĉiuj sentas la mankon de ŝi.


---

*Informo de Fred MEYER III. Niajn elkorajn kondolencojn al li.*

---

## Esperanto en prizonoj

Dum longa tempo, Esperanto-USA havas membrojn en prizonoj, kiuj uzas Esperanton kaj eĉ instruas ĝin en prizonoj. Estas ankaŭ multaj personoj en prizonoj, kiuj lernas Esperanton per la koresponda kurso.



Ĉu vi havas intereson helpi pligrandigi la rolon de Esperanto en prizonoj? Bonvolu kontakti al Brandono ĉe <bsowers@protonmail.com>, aŭ aliĝi al la Discord-servilo de Esperanto-USA kaj aŝiŝu en la kanalo #prizonoj.

— Brandono SOWERS

# La mirinda sorĉisto de Oz ... in DNA?

media hits

On July 13th, *Science Daily* **ScienceDaily** reported a research breakthrough <https://bit.ly/346KU4j> at the University of Texas, Austin:

A team of interdisciplinary researchers has discovered a new technique to store in DNA information [...] with unprecedented accuracy and efficiency. The technique harnesses the information-storage capacity of intertwined strands of DNA to encode and retrieve information in a way that is both durable and compact.

And what information did they store as their first test? An Esperanto translation of *The Wizard of Oz*, of course.

“Humans are creating information at exponentially higher rates than we used to, contributing to the need for a way to store more information efficiently and in a way that will last a long time,” says one of the


study’s authors. Naturally, we’ll need a way to efficiently retrieve our translations of L. Frank Baum, too.

Unfortunately, the article doesn’t specify whether the authors used the **Amos Broadribb**

<https://bit.ly/3fWVZaA> or

<http://www.gutenberg.org/ebooks/31348> translations.

In any case, we may soon be able to retrieve these classics from microscopic DNA drives, or splice them into the genomes of cockroaches to make them capable of surviving global thermonuclear war.



For now, the works remain accesible to the public only through low-tech storage devices like floating-gate MOSFETs, magneto/optical discs, and something called “paper.”

---

## Malbone

senintenca esperantaĵo • Ellemberg ENRIQUE



Leganto Enrique ELLEMBERG afable atentigis nin pri

novjorka strato, kies nomo estas ne nur senintence Esperanta, sed ankaŭ senintence taŭgas pro **terura akcidento tie** <https://nyti.ms/3hPQ2gG>.

La nomo de la strato estas efektive omaĝo al Ralph MALBONE, entreprenisto de la frua 19-a jarcento, kiu multon konstruis en tiu parto de la urbo. En 1918 okazis katastrofa metroo-akcidento tie, en kiu pereis ĉirkaŭ cent homoj. Iam Malbone-strato estis pli longa ol ĝi nun estas; monaton post la akcidento, la urbaj instancoj renomis ĝian plej grandan parton.

# La 17 celoj por daŭripova evoluigo por 2030

de la prezidanto • Filipino DORCAS



*Estu la ŝanĝo, kiun vi deziras vidi en la mondo.*

—Gandhi

La mondo troviĝas ĉe kriza punkto. Historio ne juĝos nin per la grandeco de niaj problemoj, sed per tio, kiel ni respondas al niaj defioj. Ĉi tiuj defioj estas gravegaj, vokante nin agi kune. La krizoj inkluzivas malsanon, rasan maljustecon, homan kontrabandadon, malsaton, senlaborecon, malriĉecon kaj poluadon.

Bonŝance ni havas kadron por kuniĝi en kunlabora strebo por la bono. La kadro estas rezulto de multaj neprofitcelaj organizaĵoj (inkluzive de ni) laborantaj kune kun la Unuiĝintaj Nacioj. Ĉi tiu kadro dokumentas la defiojn kaj malfermas la vojon por solvoj. Ĉi tiu plano estas la ***Dek sep Celoj de Daŭripova Evoluigo (17 CDE)***

<https://www.un.org/sustainabledevelopment/sustainable-development-goals/>.

Ĉi tiu retejo de Unuiĝintaj Nacioj provizas multajn informojn pri la celoj kaj respondas al la defioj, kiujn ni ĉiuj alfrontas.

Ankaŭ la Esperanto-oficejo por la U.N.

<https://esperantoporun.org> donas multajn informojn en Esperanto. Por trovi la dokumenton, elektu Esperanton kiel la lingvon, kaj serĉu *Dokumentoj > Gvidilo al la 17 celoj por daŭripova evoluo de UN*. Se vi partoprenis nian virtualan landan kongreson ĉi-jare, vi sendube aŭdis nin diskuti ĉi tiujn krizojn.

Ĉi tiuj krizoj kaj iliaj solvoj estas interplektitaj, tre interkovriĝantaj per kaj kaŭzo kaj projekto. Ĉi tiuj estas interkulturaj kaj interreligiaj projektoj de enormaj proporcioj. Kion unu homo povas fari fronte al tia enormeco? Kion povas fari nur unu organizo? La fakto ke ni esperantistoj ne povas solvi ĉiujn ĉi problemojn ne signifas, ke ni devas fari nenion. La fakto ke ni ne povas atingi ĉi tiujn celojn tuj ne signifas, ke ni ne devas komenci. Pli ĝuste, ni efektive jam komencis.

La Celoj por Daŭripova Evoluigo ("17CDE"):

1. NENIU MALRIĈO
2. NULA MALSATO
3. BONA SANO KAJ BONFARTO
4. BONKVALITA EDUKADO
5. SEKSA EGALLECO
6. PURA AKVO KAJ HIGIENO
7. PAGEBLA KAJ PURA ENERGIO
8. BONA LABORO KAJ EKONOMIA KRESKO
9. INDUSTRIO, INVENTEMO, INFRASTRUKTURO
10. REDUKTI MALEGALECON
11. DAŬRIPOVAJ URBOJ KAJ KOMUNUMOJ
12. RESPONDECAJ KONSUMO KAJ PRODUKTO
13. KLIMATA AGADO
14. SUBAKVA VIVO
15. SURTERA VIVO
16. PACO, JUSTO, FORTAJ INSTITUCIOJ
17. PARTNERECIOJ POR LA CELOJ

Ni kunlaboru ene de niaj Esperanto-organizaĵoj kaj kun ne-Esperanto-organizaĵoj kunlabore klopodante solvi ĉi tiujn problemojn. Ni ne celas meti bandaĝojn sur la vundojn, sed labori en maniero, kiu aperigos daŭripovajn solvojn.

Kion fari: Legu, lernu, ekkonu, diskutu, malkovru komunajn viziojn, aktiviĝu, kaj kunlaboru kun ni. Nia laboro kaj komunikada infrastrukturo inkluzivas niajn lokajn grupojn, la regionajn kunordigantojn, fakajn grupojn, la estraron de Esperanto-USA, retpoŝtojn, Discord, Facebook kaj aliajn amaskomunikilojn.



**Filipo DORCAS**

Filipo estas prezidanto de Esperanto-USA. Li kaj lia edzino Elizabeto loĝas en Fort Worth, Teksaso.

[filipo@grupoj.org](mailto:filipo@grupoj.org)

## La vivo de Peĉjo

ŝercoj • Timothy BORONCZYK



Teksto kaj ideo de Timoteo; desegnaĵoj de “Awesome Satyr”. (Kaŝnomo, kompreneble. Timoteo klarigas, ke la artisto preferas resti anonima.)

## De la estraro

### Finiĝas la kongresa sezono

Charlotte estas Sekretario de E-USA. Oni povas kontakti ŝin ĉe [liquidfireangel@gmail.com](mailto:liquidfireangel@gmail.com).

La somero nun finiĝas, kaj kun ĝi la kongresa sezono. Multaj el vi partoprenis diversajn kongresojn rete, kun esperantistoj tra la tuta mondo. Nia propra landa kongreso okazis rete, kun centoj da partoprenantoj el pli ol 40 landoj! Oni povas eĉ nun spekti la tutan aferon en **nia jutuba kanalo** <https://youtube.com/user/EsperantoUSA>, kaj ni plue kreis servilon ĉe Discord por niaj membroj. Ĉiu membro, kiu donis al ni retpoŝtadreson, ricevis (aŭ ricevos) ligilon al tiu servilo. Ĝi jam estas tre aktiva loko, kie niaj membroj diskutas ideojn, projektojn, demandojn, ktp.



Krom tio, mi nun pretiĝas por mia laboro kiel instruisto. La studantoj revenos al ni baldaŭ, kaj ankoraŭ estas pandemio. Mi do turnas mian atenton al tiu laboro – kiel instrui bone, sekure, kaj sane. Mi bonvenigas iujn ajn preĝojn kaj afablajn pensojn.

— Charlotte BURTON, Sekretario

## How can we be more transparent?

Hoss is one of the Directors of E-USA. You can contact him at [hoss@lodestone.org](mailto:hoss@lodestone.org).

[Esperanto-versio estas havebla en la reta versio de la bulteno.]

Although I've served EUSA in various roles over the years, this is my first report as a board member. Thank you for the opportunity to represent you.



Having worked with the board for over a decade now, I've observed a troubling amount of dysfunction. This

is not a criticism of board members past or present: in my experience, all have brought to the organization great talent, enthusiasm, and goodwill. The problem, rather, is an organizational structure that doesn't adequately serve the interests of the membership.

In other words, we have a problem with *transparency*. In order to fairly represent you, we need you to be a part of our decision-making. We need to keep you fully apprised of what we're up to—not just decisions made months ago, but also current discussion and planning. Unfortunately, very little of this information is shared, and often it's so late that it's no longer relevant.

One possible area for improvement is the minutes, the official records of our board meetings. The minutes have been available on our website for several years, but few members read them. Part of the problem has to do with freshness: minutes are released only after review and approval by the board, and that process takes at least a month, sometimes longer.

How might we make the minutes more relevant? Here's my proposal:

1. Publish unedited minutes on the EUSA website immediately following the respective board meeting. (A note can be attached if necessary to indicate that minutes have not yet been reviewed.) If the board wishes, an edited version can be substituted later.
2. Remove all password restrictions on the minutes. Access should be open and easy.
3. Send minutes to our membership email list no later than one day following the conclusion of the respective meeting. Publish a copy in the newsletter to ensure that all members have access.

So much for transparency of past board actions; what about current discussions and upcoming plans? After all, we need feedback about potentially controversial decisions *before* we make them!

Here's one idea: the board should announce to the

membership all planned expenditures in excess of some threshold (say \$500), at least one week before money is spent. That way you'll have a chance to voice any concerns while there's still time to make a difference. The primary notifications could go out to our membership email list, and copies could be posted in a special section of the website and the newsletter.

So what do you think? Comments, criticisms, and/or additional ideas are welcome. Change rarely happens without motivation, and your involvement will help spur progress.

You can reach the board at <board@esperanto-usa.org>, or send your ideas as letters to the editor (see the colophon for contact info), so that we can publish them in the newsletter for other members to see.

— Hoss FIROOZNA, Direktoro

## Volontulu helpi pri regionoj

Fred estas unu el la Direktoroj de E-USA. Oni povas kontakti lin ĉe f3meyer@gmail.com.

La Regionaj Kunordigantoj/Helpantoj de Esperanto-USA kunvenis per Zoom en Junio kaj planas denove kunveni en malfrua Aŭgusto. Dum la pasintaj kelkaj monatoj, kaj la limoj de la regionoj ŝanĝiĝis kaj kunordigantoj de kelkaj regionoj ŝanĝiĝis. La nova listo de regionoj kaj kunordigantoj estas:



### Regiono

Grandaj Lagoj  
Mez-Atlantiko  
Meza  
Meza nordo  
Nordoriento  
  
Nordokcidento  
Okcidento kaj Pacifika Maro  
Sudo  
Sudoriento kaj Kariba Maro  
Sudokcidento

### Nomo

Bill HARRIS  
Bill HARRIS  
Peggy DOLTER  
Joan PHILIPS  
Jaclyn (Janjo) PACEJO  
Wally DU TEMPLE  
John DUMAS  
Fred MEYER III  
Brandon SOWERS  
Nicole WING

La plej aktualan liston, kun kontaktadreso, oni povas ĉiam trovi en nia retejo, ĉe *Pri ni > Kontakti nin*.

Vi povas vidi ke Bill HARRIS, la Direktoro de la Centra Oficejo, estas dumtempa kunordiganto de du regionoj. Ni ankoraŭ bezonas regionajn kunordigantojn por la regionoj Grandaj Lagoj kaj Mez-Atlantiko. Bonvolu volontuli, se vi loĝas en unu el tiuj regionoj. Mi volas danki la antaŭajn kunordigantojn Murray MERNER, Chris NELSON, James BRIDGE, kaj David KOCH pro ilia antaŭa helpo.

— Fred MEYER, III

## Pri tradukado

Timoteo estas unu el la Direktoroj de E-USA. Oni povas kontakti lin ĉe gartherio@gmail.com.

Ĉu vi malfeliĉas, ke iu verko ankoraŭ ne estas en Esperanto? Ĉu vi volas kleriĝi rapide pri la lingvo? Traduki, amiko, estas via laboro nun.

La procedo:

Unue, la tradukanto devas kontroli, ĉu la traduko estus eldonebla. Oni tute rajtas traduki ion ajn se la celo estas havi la tradukon je nur la propra librobreto. Se eldonado estas la celo,



unue kontrolu, ĉu vi rajtas fari tion.

Due, estu certa, ke la tradukota verko interesas al vi sufiĉe, ke vi volas pasi multe da tempo kun ĝi. Vi relegos ĝin multfoje. Vi pensos profunde pri preskaŭ ĉiu frazo en ĝi. Ne estu surprizata se vi sonĝos pri ĝi.

Trie, tralegu la verkon, en la originala lingvo dufoje, se vi povas. Lernu la stilon de la verkisto.

Kvare, faru vortaron. Vi en la estonteco dankos vin mem. Se dum via legado de la originalo vi rimarkis vorton aŭ frazon ofte uzitan, aŭ nekutime uzitan, skribu ĝin kaj trovu la tradukon. Multaj fakaj verkistoj en naturaj lingvoj emas distingi sian verkon parte uzante vortojn unike. Eviti tion estas nepre en universala lingvo. Ĉiam kontrolu, ĉu traduko jam ekzistas por io.

Kvine, komencu la tradukadon. La procezo ĉiam postulos pli da tempo ol vi kredis, ke ĝi postulos. Grandajn partojn vi devos refari. Fojfoje vi revenos al la laboro kaj ne komprenos tion, kion vi skribis. Tamen, kiam vi metas la finan signon je la fina frazo, ripozu feliĉe ĉe la pinto de tiu monto.

Kaj sese, post ferio kaj festo, komencu grimpi la sekvan monton: redaktadon. Laŭ mia opinio, nenio eldoninda ne sangis (per ruĝa inko) antaŭ ol pretiĝi. Relegu vian tradukon. Vi fojfoje dubos la kapablon kaj saĝecon de vi en la estinteco, sed tiu homo kreskis ĝis esti vi nun - pli klera kaj saĝa. Kiam vi tralegis vian malneton kaj ĝustigis ĝin, trovu alian homon pacienca, kiu ankaŭ interesiĝas pri tio, kion vi

tradukis. Formetu vian fierecon kaj aŭskultu.

Kiam vi kaj la redaktisto(j) konsentas pri ĝustigoj, serĉu manieron disvastigi la novan tradukon! Mi ne spertas multe pri tio, sed se vi legas ĉi tion, vi estas membro de organizo, kiu enhavas multajn homojn, kiuj ja spertas pri tio.

Se vi ne volas zorgi pri kopirajto, la publika havaĵo estas bona fonto. Laŭ usona leĝo, ĉio verkita antaŭ ol la jaro 1925 estas libera.

Laŭ mia propra opinio, Esperantujo ja bezonas tradukojn de la sekvaj verkoj. Ĉu vi volas vian nomon post la vortoj “tradukita de” je la titolpaĝo de unu el ili?

- *Drakulo* de Bram STOKER (parta traduko ekzistas je Vikilibroj).
- La verkoj de Jane AUSTEN (parta traduko de *Fiereco kaj antaŭjuĝemo* de Don HARLOW jam ekzistas).
- La verkaro de usonaj pensistoj - ekzemple Frederick DOUGLASS, Henry David THOREAU, Susan B. ANTHONY, kaj ja tiel plu.

Vi eble demandas: “Tiĉjo, kion estas tradukanta vi?” Nu, mi ankoraŭ estas redaktanta la regulojn de ludosistemo, kiun mi ektradukis antaŭ preskaŭ tri jaroj. Vi havas la oportunon esti pli kompetenta ol mi je via tradukado.

Laboren!

— *Timoteo RICE, Direktoro*

# La historio de psikedelismo en Usono

## Unua parto: ĝis la jaro 1960

kulturo • Steve EICHBLATT

La unua artikolo en triparta serio.



**H**oma uzo de halucinogenaj substancoj datiĝas ekde la pratempo. Niaj prauloj sendube manĝis halucinogenajn plantojn kaj fungojn, kaj ili ne forgesis la psikajn efikojn, eĉ se ili ne sciis, precize kiel utiligi ilin. La lastatempa historio estas simila.

En nia tempo oni asocias la vorton *psikedelismo* kun hipioj, “floropovo”, kaj la kolorplenaj artaĵoj de la 1960-aj jaroj. Sed la historio de psikedelismo en Usono datiĝas jam de la 1880-aj jaroj, kaj imponaj epizodoj okazis jam en la 1950-aj. En 1968 la usona registaro malpermesis ĉiujn halucinogenajn drogojn, eĉ por sciencaj studoj, ĉar oni vidis en ili ilojn de la kontraŭkulturo.

Ekde la 2000-aj jaroj, registaroj komencis permesi al eta nombro da sciencistoj studi la substancojn klinike. Per modernaj iloj oni komencis ekscii, kiel la drogoj funkcias en la cerbo. Same kiel niaj prauloj, ni provadas trovi aplikaĵojn por tiaj potencaj substancoj.

Impona frua rolulo en usona psikedelismo estis la eminenta angla intelektulo Aldous HUXLEY. Li

naskiĝis en granda kaj nobla familio de filozofoj kaj biologoj. Lia avo Thomas Henry HUXLEY kunlaboris kun Charles DARWIN. Julian, frato de Aldous, kontribuis al evoluismo.

Aldous loĝis en Losanĝeleso ekde 1937, kaj dum sia vivo li verkis almenaŭ 50 librojn pri diversaj temoj: fikcio, arto, religio, filozofio, biologio, kaj pli. Nuntempe li estas eble plej konata pro sia romano *Brave New World* (“Brava nova mondo”, 1932).

Huxley profunde zorgis pri la estonteco de la homaro. Li kredis, ke natura evoluo ne sufiĉe rapidas por eviti nian mem-detruadon. Kaj kiel Zamenhof, li kredis, ke niaj similecoj pli gravas ol niaj malsimilecoj.

Zamenhof kreis homaranismon kiel ponton inter religioj. Huxley studis la mistikulojn de diversaj religioj, kaj trovis, ke ili ĉiuj havas la saman vizion pri la spirita mondo. Ili forte sentas, ke en tiu mondo homoj estas profunde kunligitaj, fakte tute samaj. Huxley kaj lia kolego Gerald HEARD praktikis la orientan spiritualismon dum jaroj, tamen ili ne sufiĉe kvietigis la egoon por atingi nirvanon.

Huxley rimarkis, ke ĉiu drogo uzita por eskapi la ĉiutagan mensan staton finfine detruas la uzanton – ĉu alkoholo, opio, kokaino, ktp. Kaj en *Brave New World* li imagis drogon *soma*, kiu pacigas homojn, sed finfine malfortigas ilin. Li tamen ne ekskludis la eblon, ke nedetruanta drogo povas ekzisti. En 1931 li skribis, “kiu ajn eltrovos pli bonan alternativon estos inter la plej grandegaj bonfarantoj al la homaro”.

Pli ol dudek jarojn poste, en 1952, Huxley legis pri esploroj pri meskalino fare de du anglaj psikiatroj, Humphrey OSMOND kaj John SMYTHIES. Huxley interesiĝis pri tio, ke meskalino povas kaŭzi religian ekstazon.



Gerald HEARD, Aldous HUXLEY kaj Kapitano Al HUBBARD.  
(De trippingly.net)

Same kiel multaj medicinaj esploristoj tiutempe, Osmond kaj Smythies vidis en meskalino ilon por esti mallongdaŭran skizofrenion kaj aliajn mensajn malsanojn. Ili rimarkis, ke homoj provantaj meskalinon foje freneziĝas, sed post kelkaj horoj tute resaniĝas. Eble, ili pensis, psikiatroj pli bone traktos frenezulojn se ili mem povos sperti tiun frenezan mensostaton.

Huxley sendis leteron al Osmond, dirante, ke li volas provi meskalinon. En 1953, Osmond veturis al Losanĝeleso kaj donis iom al li. La halucina sperto por Huxley fariĝis la bazo de lia libro *The Doors of Perception* ("La pordoj de percepto", 1954), nomita per la vortoj de poeto Robert BLAKE: "Se oni purigus la pordojn de percepto, ĉio aspektus al la homo kiel ĝi estas, senfina."

En la libro, Huxley diras, ke meskalino provizas "sperton de estiminda valoro al ĉiuj, aparte al la intelektulo." Finfine li trovis sian longe serĉatan ĥemian helpilon.

Kompreneble, kelkaj homoj akuzis al Huxley, ke li instigas siajn legantojn al droguzado. Tamen li daŭre esploris la efikojn de meskalino, kaj poste de LSD. Je 1956, li verkis eseon *Heaven and Hell* ("Paradizo kaj infero") pri la sama temo.

La psikiatro Osmond daŭris esplori kun Huxley kaj

lia kolego Gerald HEARD. Fakte, Osmond elpensis la anglan vorton *psychedelic* (greke, "klarigi la menson"). Huxley mem proponis *phanerothyme* ("briligi la animon").

Osmond ankaŭ prezentis s-rojn Huxley kaj Heard al Al HUBBARD, memkreita riĉulo kaj estro de la firmao *Uranium*. Hubbard estis needukita sed spritega. Tuj post la renkontiĝo kun halucinogenaj substancoj, li dediĉis sian energion kaj monon por disvastigi iliajn avantaĝojn.

Por Hubbard, la drogoj utilis por krei religian ekstazon, kaj li instinkte sciis, kiel eviti iliajn danĝerojn. Specife, li sciis kiel eviti la psikozojn. Kiam oni komencis senti teruron, Hubbard montris belajn fotojn, aŭ ludis trankviligan muzikon, kiu tuj deturnis la subjekton al pli feliĉa sperto.

Tiu neverŝajna duopo – Huxley la teoriulo, kaj Hubbard la praktikulo – estis bona teamo. Huxley kredis, ke se la plej altaj membroj de la religia, politika, arta, kaj edukita klasoj povos sperti la psikedelan konsciostaton, ili gvidos mondkulturon al pli ĝusta vojo.

Ili ja sukcesis allogi multajn homojn al LSD, kaj ŝanĝi multajn mensojn. Estas tamen dubinde, ĉu la psikedela revo de Huxley, Heard, Osmond, kaj Hubbard – ne tute malsimila al Zamenhof-a revo de Homaranismo – savos la homaron de memdetruado. Aŭ ankoraŭ ne. Sed Huxley, kiel Zamenhof, daŭris labori por sia revo ĝis la morto. Sur sia mortolito en 1963, Huxley petis al sia edzino injekti 200 mikrogramojn da LSD en lian korpon, kaj li forflugis al la alia mondo.



**Steve EICHBLATT**

Steve loĝas en Novjorko kun sia edzino kaj filino. Li estas fizikisto, programisto kaj financisto. Li ŝatas legi, esplori la urbon, aŭskulti muzikon de Bob DYLAN, kaj esti kun

sia familio.

**steve.eichblatt@gmail.com**

# Ĉu komputero, komputilo, komputoro, komputro, aŭ kio?

el la arĥivo

En ĉi tiu numero nia tempomaŝino vojaĝas retroen al la jaro 1977, kiam en n-ro 1977:1 de nia bulteno aperis la jena enketo. Estas eble amuze, de nia nuna starpunkto, viziti tempon kiam la esperantistaro ankoraŭ ne decidiĝis pri nomo por ilo, kiu estas nun tiel intime interplektita en la ĉiutaga vivo.



Ĉu komputero, komputilo, komputoro ... ?

De post la Dua Mondmilito, konstante pli gravan rolon en la vivo havas tio, kion *Plena Ilustrita Vortaro* nomas **komputero** kaj difinas:

Tiu elektronika aŭtomato, regata per programo, kiu efektivas instrukciojn por la operaciado de donitaĵoj aŭ informoj, kun sciencaj, administraj aŭ kontadaj celoj.

La prigraviĝon de la dirita objekto spegulas niaj vortaroj mem, ĉar la termino aperas nek en *Plena vortaro* nek en ties en 1954 aperinta *Suplemento*.

Eble ĝuste pro la fakto, ke la termino tiel malfrue registriĝis en iom aŭtoritata fonto – *PIV* aperis nur en 1970, kaj la vorto ĝis hodiaŭ ne “oficialiĝis” laŭ la malnova senco de Akademia akceptiteco – ĝia formo restas ĝis hodiaŭ tute malstabila. Ekzemple en la indekso de fakdelegitoj en la *Jarlibro* de UEA, 1976, aperas **komputero**; la indekso al revuo *Esperanto*, 1976, enhavas la terminon **komputilo**; kaj en tiu sama jarkolekto aperas la artikolo “Lingvaj baroj kaj **komputoro**”.

Sendube la plej gravan devojigon de la *PIV*-a formo prezentas la t.n. *Komputilteknika vortaro* (efektiva titolo: *A vállalatirányítási számítógép-alkalmazás fogalmainak többnyelvű szótára*). Ĉi tiu libro enhavas 882 terminojn en lingvoj hungara, germana, angla, rusa kaj esperanta, en aranĝoj laŭ kategorio, alfabeto kaj kodnumero. Ĝian esperantan parton redaktis d-ro Antal Münnich. La terminaro estas ne simple privata entrepreno, sed oficiala dokumento de la Konsilumo por Reciproka Ekonomia Helpo kaj do de ties membro-ŝtatoj: Albanujo, Bulgarujo, Ĉeĥoslovakujo, Germana D.R., Hungarujo, Mongolujo (Ekstera), Pollando, Rumanujo kaj Sovetio. La baza termino en la *Komputilteknika vortaro* estas la verbo **komputi** (laŭ *PIV*: **komputeri**). La vorto **komputi** ja aperas en *PIV*, sed kun difino sen rekta rilato al **komputero**.

Ekzistas ankaŭ malakordo pri la plej bona nomo por la “donitaĵoj aŭ informoj” menciitaj en la *PIV*-a difino de **komputero**. *PIV* mem evidente evitas la demandon. La *Komputilteknika vortaro* ekvivalentigas la anglan **data** kaj la esperantan **datumo**. Heinz D. Maas en sia libro *Enkonduko en la komputeran lingvistikon* (1972), teksto de Someraj Universitataj Kursoj, uzas la formon **datenoj**.

Konstatante la supre skizitan terminologian ĥaŝon, s-ro Rüdiger Eichholz, kiu de 1975 havas inter pluraj aliaj movadaj oficoj tiun de direktoro de la Terminologia Centro de Internacia Scienca Asocio Esperantista, decidis esplori la aferon per cirkulero al la kunlaborantoj de la Terminologia Centro kaj al ĉiuj aliaj interesitoj. La cirkulero enhavas argumentojn de Antal Münnich, Gerhard Kalckhoff (aŭtoro de neeldonita terminaro pri la koncerna fako), Rüdiger Eichholz, R. Haferkorn, O. Reiersøl, A.C. Pick, Hans D. Maas, M. Falla, Gaston Waringhien kaj J. Jäntti. Aldonita al la cirkulero estas voĉdonilo. Surbaze de ricevitaj voĉdoniloj s-ro Eichholz esperas fari definitivon solvon al la problemo, nome de la Terminologia Centro de ISAE.

La cirkulero estas senpage havebla ĉe Terminologia Centro de ISAE, Ontario, Kanado. Enkalkuliĝos voĉdoniloj ricevitaj ĝis la 30-a de Junio 1977.

# Laboro frustra, sed (espereble) agrabla

traduku! • HOSS FIROOZNIA

La rubriko *traduku!* prezentas al vi diversajn tradukdefiojn. En paraj numeroj aperas tekstoj en Esperanto por enangligi; en neparaj, tekstoj en la angla por elangligi. Leginte viajn respondojn, ni faros resumon de la diversaj provoj, kune kun reagoj, komentoj, kaj proponoj.

**K**elkaj el la lastatempaj tradukdefioj estis ege malfacilaj; unu partopreninto eĉ nomis ilin “sadismaj”. La turmento ne estis sencela, tamen: per strebado en tradukado, oni riĉigas sian lingvan scipovon!

Malfacila tradukado povas riĉigi ankaŭ Esperanton mem. Kiel Zamenhof diris en unu el siaj *Lingvaj respondoj* (n-ro 25):


... estas tre dezirinde, ke ni ne evitu malfacilajn tradukojn, sed kontraŭe, ke ni ilin serĉu kaj venku, ĉar nur tiamaniere nia lingvo plene ellaboriĝos.

Do ne kulpigu vian kompatindan redaktoron pri la sadismaj defioj – kulpigu Zamenhofon!

Efektive, mi ne volas fortimigi legantojn. Kaj aperiginte la defion en n-ro 2020:2, mi komencis vere maltrankviliĝi: *Ombro sur interna pejzaĝo* estas aparte defia verko por enangligo. Ĝia teksto prezentas al ni paradokson: unuavide, ĝi aspektas relative simpla, kun mallongaj frazoj kaj lingvaĵo plejparte ĉiutaga. Sed tiuj simplaj frazoj ofte aludas al aferoj malsimplaj, kaj iliaj signifoj povas resti nebulaj sen plena kompreno de la kunteksto.

Unu el niaj partoprenantoj (BS) resumis la paradokson tre bele: “Kiel oni povas verki tiel klare, sed tiel netradukeble? Kaj kiel tradukado povas esti tiel frustra, sed tiel agrabla?”

Feliĉe, mia timo finfine pruviĝis senbaza; en la



**Ombro sur interna pejzaĝo**

<<https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=2359>>  
estas klasikaĵo de la Esperanto-literaturo.

redakcia poŝtkesto aperis mirinde bunta rikolto de bone elpensitaj tradukoj – naŭ entute! Ĉu tio signifas, ke estontece mi proponu eĉ *pli* defiajn tekstojn? (Muhuhahaha...)

Elkoran dankon kaj gratulon al niaj bravaj tradukintoj: BA, BS, CL, JN, JP, MA, RB, RH, kaj SB. (Fu!) Mi ege ĝuis kompari iliajn laborojn, kaj vidi kiel sprite – kaj diversmaniere – ili atakis la defiojn. Ne eblas dividi ĉion en unu artikolo, do en la reta versio de la artikolo mi faris apartan tabelon kun la proponoj aranĝitaj paralele.

Jen kelkaj el la plej interesaj esprimoj kaj parolturnoj:

**Jen la tuta saĝaĵo.** — Tradukdefioj preskaŭ neniam havas nur unu “ĝustan” solvon, kaj kiel tiu ĉi frazo bone ilustras, solvoj povas esti tiom diversaj, kiom la tradukantoj mem. De niaj naŭ partoprenantoj venis ok malsamaj proponoj:

1. *Here is my wisdom on the matter.*
2. *Here's the whole tale.*
3. *That was the whole thing.*
4. *That's the long and the short of it.*
5. *And that was the size of it.*
6. *There's the whole truth.*
7. *That pretty well sums it up.*
8. *That's what it boiled down to.*

Cetere, la frazo estas bona ekzemplo ankaŭ de la foja ambigueco en la fontoteksto: al kio, precize, indikas *jen*? Ĉu al nova penso en aperonta frazo (kiel en proponoj 1–2), aŭ al penso esprimita en jam aperinta frazo (3–8)? Ambaŭ interpretoj estas pravigeblaj, sed laŭ mi, la dua ŝajnas pli probabla. Kaj mi aldonas naŭan proponon: *That's all there was to it.*

**Iun matenon vekiĝis fremdulo sur mia kuseno.** — Preskaŭ ĉiuj redonis *fremdulo* per *stranger*, kiu ja estas la ĉefa senco ĉi-kuntekste: la edzo de la rakontisto emocie drivis for, fariĝinte por ŝi nekonato.

Aparte pensiga estas la propono de RH: *foreigner*. La temo ne aperis en la teksto de la defio mem, sed grava

afero tra la romano estas la du-nacieco de la geedza paro: ili parolas komunan hejman lingvon (Esperanto), sed ili venas el malsamaj landoj, lingvoj, kaj kulturoj. Do la “fremdeco” de la edzo povas esti dusignifa. Ŝtimec povintus uzi pli precizan vorton, ekzemple *nekonato* (pli proksiman al *stranger*) aŭ *alilandano* (pli proksiman al *foreigner*), sed finfine ŝi elektis *fremdulo* – vorton kiu enhavas ambaŭ sencojn.

**Lia kiso enpenetris nur tra la plej maldika tavolo de mia haŭto.** — Kelkaj redonis la frazon en fidele laŭvorta formo. Ekzemple JN proponis: *His kiss only went as deep as the thinnest layer of my skin*. Aliaj elektis similajn esprimojn pli nature anglecajn, ekz. BS: *His kiss barely brushed my skin*. Kaj kelkaj revertumis por klarigi la sencon, ekz. JP: *His kiss was nothing more than a habit*. Ne estas klare (almenaŭ al mi) kiu aliro estas preferinda.

**Li ekmalĉeestis.** — Jen la plej diableca el la defioj, ĉar ĝi prezentas vortludon esence netradukeblan. Gravus ne nur la signifo, sed ankaŭ la sono, ĉar en posta alineo iu ŝercas pri la longa, stakata sinsekvo de silaboj: *Li ekmalĉeestas, Ekmalĉeestas! Vidu kiel bela vorto! Kvazaŭ azteka!*

Kompreneble, laŭsignifa enangligo de *ekmalĉeestas* tute ne sonas “azteka”. Do kion fari? Unu aliro estas inventi novan ludon, kiu donos espereble similan impreson. Ekzemple, JN ludis pri la franceca sono de latinida vorto: *He’s starting to evanesce! Oh, what a nice word! Almost French!* Kontraste, BS turnis sin al ritmo: *He’s begun to be gone! Begun to be gone! What a lovely rhythm, like a train leaving the station!* Aliaj elpensis simile kreemajn proponojn.

La plej sekura solvo, kompreneble, estas konservi la lingvaĵon de la fontoteksto – se entute eblas tion fari. BA konservis ĝin per eta aldono: *I tried to amuse myself, thinking how I would describe the situation in Esperanto. He started to not be present. “Malĉeestis.” I mouthed the Esperanto word.*

Kutime tia solvo ne eblas, aparte se tradukanto celas kaŝi la fremdecon de la verko. Sed en tiu ĉi rakonto, feliĉe, Esperanto ludas gravan rolon. Do konservi la vortludon en ĝia originala formo estas en ordo, eble.

**Tio estis kvazaŭ karesprovo.** — La rakontisto reagis al la vortludo. Inter la proponoj: *an attempt to*

*lighten my spirit; like a pat on the head; almost like a caress; almost a stab at affection; trying to give me a hug; trying to comfort me.*

**Ĉu tio estas signo de disfalo?** — Denove ni alfrontas vorton (*disfalo*) kun multaj eblaj tradukoj en la angla. Kaj denove, la solvoj estis tre diversaj: *falling/growing apart; breaking down; slipping away; impending ruin; the end; impending breakup; kaj dissolution.*

**Kial mi estis pli eltenema ol li?** — La sencogamo de *eltenema* estas iom vasta, kaj kelkaj provis konservi tiun vastecon: *more resilient; able to tolerate things better; able to withstand more*. Aliaj proponis pli precizajn esprimojn laŭ la kunteksto de streĉa amrilato: *more inclined to hold on; want to hold on longer; more willing to stick it out.*

Kaj jen provo kunfandi la diversajn proponojn en unu sintezan tradukon:

He’d grown tired of our life together. I hadn’t. That’s all there was to it.

One morning a foreigner awoke in my bed. His kiss barely brushed my skin. He’d begun to be absent. That’s how he started to disappear, at first. Later he would leave in person, too.

I liked coming home. Yet as I slid the key into lock, I knew I’d find the house empty. Recently he’d taken to wandering off somewhere. And even when he was home, he wasn’t. Then the voice, in an attempt to lighten the mood, offered a diagnosis: “He’s begun to be absent! Begun to be absent!” *Mal-che-est-is* was the Esperanto word it used. “How pretty!” it said. “Almost like Aztec!”

I had to smile at my little voice’s attempt. It was almost trying to comfort me. But its humor didn’t last long. The sadness managed to seep back in.

Did he feel that it was all over with? Did it bother him that I knew him too well? I was more familiar with his repertoire of stories than he was, and sometimes I could even fill in the gaps when he was telling them. Was that a sign of collapse?

Once we were talking about our first loves. I had to correct him: “Wait, you skipped over the Japanese girl.”

"What Japanese girl?"

"The one when you were in the army!"

"You know, you're right. Soon I'll need to ask you the name of my great-grandmother's dog."

We laughed. At the time, it seemed funny. Only later did it hurt.

Why was I more willing to stick it out than he was? Was it because I'd spent years alone before meeting him? Had I accumulated an inexhaustible patience for living with another person?



## La nova tradukdefio

Por fari la rubrikon espereble malpli sadisma – almenaŭ momente – jen defio iom alispeca. Eble ĝi estas pli simpla ol kutime ... aŭ eble ne.

Verŝajne la furora infankanto **Dek bovinoj**

<<https://youtu.be/gh9w7QpyQtY>> bezonas neniun

enkondukon. Ĝian tekston verkis Pablo BUSTO kaj Liven DEK en 2016. Mi ne petas vin enangligi la version, nur la refrenon:

Ni bovinoj ŝatas muĝi  
Kaj manĝadi freŝan herbon.  
Ni tre ŝatas la kamparon  
Kaj ripozi longan tempon.

Ni bovinoj estas grandaj  
Kaj produktas multan lakton.  
Nia kapo havas kornojn  
Kaj la buŝo grandan langon.

Feliĉe la linioj ne rimiĝas, iom simpligante vian taskon. Sed la traduko devas resti kantebla laŭ la originala melodio, do necesas konservi la ritmon.

Ĉu vi povas redoni la refrenon en taŭga anglalingva formo?

---

La redakcio (trovu la adreson en la kolofono) akceptos vian tradukon **ĝis la 15-a de Decembro**. Bonvolu sendi **nur unu** tradukon, ne plurajn diversajn provojn. Sukceson!

---

---

## Kolofono

Redaktoro / Editor: Hoss FIROOZANIA

**Kontaktu nin:** <bulteno@esperanto-usa.org>, aŭ:

Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia  
CMC #271205, University of Rochester  
500 Joseph C. Wilson Blvd.  
Rochester NY 14627-1205  
United States of America

*Usona Esperantisto* estas la dumonata bulteno de Esperanto-USA. Bonvenaj estas kontribuoj kaj en Esperanto kaj en la angla. Prefere sendu materialojn retpoŝte, kaj aldonu viajn nomon, adreson kaj foton. Kun aliaj fotoj aldonu notojn pri datoj, lokoj, kaj nomoj de la foti(n)toj. Ni resendos poŝte senditajn materialojn se vi aldonas mem-adresitan, aŭ frankitan koverton.

La enhavo de *Usona Esperantisto* estas reuzebla laŭ la permesilo CC BY-SA <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/2.0/deed.en>>. Ni petas, ke oni tamen atentu du monatojn antaŭ ol represi la plej freŝajn artikolojn.

Opinioj esprimitaj en *Usona Esperantisto* apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre spegulas vidpunktojn de la redaktoro aŭ de Esperanto-USA.

Kontribuantoj eble volus legi la kalendaron de limdatoj kaj redakciajn konvenciojn en nia retpaĝaro.



*Usona Esperantisto* ("American Esperantist") is the bi-monthly magazine of Esperanto-USA. We welcome contributions in both Esperanto and English. Please send materials by email if possible and include your name, address, and photo. With other photos please include the photographer's name along with subject(s), location, and date. We will return mailed contributions if you include a self-addressed, stamped envelope.

The contents of *Usona Esperantisto* may be reused under the Creative Commons Attribution-Share Alike license <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/>>. We ask that you wait two months before reprinting the latest content, however.

Opinions expressed in *Usona Esperantisto* are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of the editor or of Esperanto-USA.

Contributors may want to consult the submission calendar and style guide on our website.